

Propono



Baladaj ĉendancoj	2
kaj rilataj temoj	2
Menuo	4
Kurso: Feroaj baladoj kaj Esperanto.....	4
Vespera programo: Ĉendancu baladojn...	5
Kurso: Kiel tonsilabi.....	5
Kurso: Tradukarto.....	6
Vespera programo: Koncerto popolmuzika	6
Taga programero: Balada ĉendanceto	6
Bezonoj	6
Ĉendancejo.....	6
Kamerao	7
Prelegejo	7
Pago.....	7
Anonco	8
Al ILEI-konferenco, Nyíregyháza 2016-8: .	8

Baladaj ĉendancoj

kaj rilataj temoj

Ĉendanci baladojn estos bona "metodo" lerni, fortigi kaj memoratigi nian lingvon. Baladaj ĉendancoj hodiaŭ en Esperantujo estas fenomeno pli-malpli neekzistanta. Mi konkludis ke ni ŝanĝu tion, ĉar jen atendas al ni grava ilo vivigi esperanton kaj esperantomovadon per agrabla etoso en kunvenoj kaj fortika lingvokono ĉe parolantoj.

Por kompreni pri kio temas, rigardu je

<https://www.youtube.com/watch?v=DXN1c11ZyqI>,

<https://www.youtube.com/watch?v=IL3e8doV9kI> aŭ

<https://www.youtube.com/watch?v=i1h0qCPdTq4> .

Jam en ok diversaj esperantoaranĝoj* mi ĉendancigis homojn. Post tiuj spertoj mi alvenis al jena programo:

La balada programero estu kaj taga kurso kaj vespera distro, ĉiutaga. Vidu malsupre sub rubriko Menuo.

Prefere ĈIUvespere dum lastaj DU horoj faros mi sesion por ĉiuj "Ĉendancu baladojn". Dum tiu sesio ni ĉendancos, kantos kaj alkutimiĝos al tiu maniero kune ĝui. La ripetado vesperon post vespero estas bezonata por ke homoj vere komencu lerni kaj kompreni la aferon, aŭtomatigu en si la dancon kaj malstreĉiĝu. Dum la du horoj, neniu balado ripetiĝos, sed oni rekonos la samajn baladojn en venontaj vesperoj. La sesio povas okazi apud loko kie homoj sidas, ripozas kaj babilas, sed ne tro bruas.

Enkonduko al la tuta afero pri baladaj ĉendancoj estas la prelegoj Feroaj baladoj kaj Esperanto. Tio komencu baldaŭ kiam ĉiuj kunvenanoj alvenis. Poste mi volas doni lecionojn "Studu baladon", ĉiutage kun alia balado. Ni tiam studos baladon el vidpunktoj de enhavo, historio kaj lingvo. Tiuj lecionoj estos interesaj speciale por instruistoj, sed ili ne maltrafu tamen la vesperajn sesiojn por ke ili fariĝu kompetentaj pri uzo ĝenerala de baladoj.

Ĉiu kursano povos elekti por si unu aŭ plurajn baladojn kiujn parkerigi kaj lerni estri mem. Ni esperu ke la kurso fariĝos ia "erupcia momento" por balada kulturo en Esperantujo.

Atendante vian reagon, amike vin salutas

Martin Strid
+46 - 703 152 615

.....''.....''><(((°>.....''.....

* Ni ĉendancis en: 2014 FERO Borlänge, 2015 SEF-kongreso Uppsala, Elfriden, UK Lille, NR Saarbrücken, 2016 PSI Bad Hersfeld, Mirinda Lviv, SEF-kongreso Gdansk.

Menuo

Kurso: Feroaj baladoj kaj Esperanto

La esenco de ĉi kurso estas enkonduki novan kulturan fenomenon en la internacian movadon. La kursanoj lernos ĉendanci kaj kunkanti. Ĉiun tagon kaj vesperon ni dancos baladojn, por doni eblecon al homoj vere lerni ĝui tiun kunestoformon, ĉar baladdancoj helpis savi la feroan lingvon kaj povas fortigi ankaŭ esperanton.

Unua prelego: Feroaj Insuloj – historio de baladoj – kiel ĉendanci – karaktero de feroaj baladoj – kiel baladestri – kial baladojn por Esperanto – kiel verki baladojn – kiel baladigi poemojn – verkado de novaj baladoj en esperanto – nova verko Ĉendancu baladojn

Dua prelego: Enhavo de la nova verko Ĉendancu baladojn – rakontoj, rekantaĵoj, melodioj – kvaronmilon da baladoj novaj kaj malnovaj, longaj kaj mallongaj, dramaj kaj humuraj, de diversaj aŭtoroj, originalaj kaj tradukitaj

Tria prelego: Interkona balado – verku strofon pri vi – kaj elektu propran baladon – aŭ eble plurajn – por parkerigi ĝin kaj poste estri mem en ĉendanco

Kvara prelego: Studu baladon – Studu Esperanton per baladoj – instrui lingvon (kaj movadan historion) per konversacia kurso – lerni bonan tekston en Esperanto

Leciono pri unu balado enhavas laŭtleĝon kaj lingvan komprenon, parolon pri rakonta celo, poezio, metaforoj, gramatikaj figuroj, verkinto, tradukinto (se iu) kaj historiaj cirkonstancoj de la balado, ritman recitadon aŭ kantadon kaj eĉ foje ĉendancon (se iu jam parkeras ĝin).

Vespera programo: Ĉendancu baladojn

Estu ĉiuvespere lasta programero dum du horoj:

- laŭvica parto de Valdemara balado,
- ripeto de aliaj baladoj de antaŭaj vesperoj,
- iom da novaj baladoj el la balada kajero de Granda Kurlo:

Unua vespero: Ezopa Saĝo – kvar fabloj de Kalocsay + El Atlantika Maro – du feroaj baladoj

Dua vespero: Mezepoke – skandinavaj baladoj

Tria vespero: Inter ni – novaj movadaj baladoj

Kvara vespero: Naciaj epopeoj – fragmentoj laŭ Mickiewicz, Petöfi kaj Rustaveli

Kvina kaj sekvaj vesperoj: Folklore – tradukitaj kantoj

Homoj kiuj scias la paŝojn povos veni en la ĉendancon kaj foriri el ĝi laŭplaĉe dum la danco.

Kurso: Kiel tonsilabi

Baladaj melodioj estas notitaj per tonsilaboj, kio estas evoluo de muzikinstrua metodo de Zoltan Kodály. Ili uzeblas por tajpe noti ĉian ajn muzikon, dancopaŝojn kaj pli. Jena kurso klarigas ilin.

Unua leciono: Tonsilaboj kompare kun klavbildaj muziknotoj – Takto kaj tonskalo – Trovi melodiojn laŭ tonsilaba vicordo

Dua leciono: Historio de tonsilaboj – Naturtonoj, kvarontonoj kaj ritmo

Tria leciono: Kanti tonsilabojn

Kvara leciono: La komputila programo Tone – Aliaj specoj de taktsilaboj

Kurso: Tradukarto

Ĉi kurso resumas mian multjaran sperton mem traduki en esperanton por Norda Kantaro (<http://nk.tone.se>).

Unua leciono: Metodo traduki poemon

Dua leciono: Ekzerco traduki poemon

Vespera programo: Koncerto popolmuzika

Koncerto de Granda Kurlo: Kantoj ravaj skandinavaj – arde kaj arĉe

Programero: Balada ĉendanco

Por nur unutaga evento kun densa programo: Balada ĉendanco dum inter 20 minutoj kaj 2 horoj.

Bezonoj

Ĉendancejo

Teknikaj bezonoj por balada ĉendanco estas sufiĉe simplaj:

1. La grandeco de la ĉambro konvenu al la nombro de partoprenantoj. La ĉefa spaco de la ĉambro estu malplena planko kie eblas danci. Tiom da kvadratmetroj kiom da dancantoj estas bona mezuro.
2. Estu bona akustiko por senpera parolado kaj kantado. Interalie, estu silente se oni silentas, do malmultu la ĉirkaŭa bruoj.
3. Prefere estu la planko iomete elasta aŭ "resaltiga". Alivorte, lignotabula planko estas pli bona ol betona aŭ ŝtona planko.

4. La lumo en la ejo estu iom varmkolora kaj milda, por doni agrablan malstreĉan etoson. Do ne havu tre fortajn lampojn.

5. Ni NE bezonas elektronikajn mikrofonon, laŭparolilon ktp. Tiaj aferoj preferinde eĉ ne videblu en la ejo nek en ĝia tuja proksimeco.

Kamerao

6. Fine mi volas aldoni: Se vi povos trovi iun, kiu kapablos bonkvalite tutajn filmi la baladojn ĉendancatajn por poste meti tion en Jutjubo, Vimeo aŭ simile, tio estos ege tre bonega por la afero.

Prelegejo

7. Projekciilo por perkomputila prezento, kajaŭ

8. Skribtabulo aŭ afiŝformataj paperoj kun dikaj tuĉoj.

Pago

Neniom petas mi monan rekompenson por doni baladan kurson, kvankam bonvena estus malaltigo de partoprenkotizo. Resti en simplaj, eĉ primitivaj kondiĉoj mi pretas, amasloĝeje ankaŭ. Kaj mian vojaĝon mi pagos mem.

Anonco

Al ILEI-konferenco, Nyíregyháza 2016-8:

Unu el la unuaj aliĝintoj de la ĉi-jara konferenco, Martin STRID el Svedio, proponis kurson pri baladaj ĉendancoj kaj poste ĉiutagajn danĉorojn, inspiritajn de feroaj baladoj kaj adaptitajn al Esperanta poezio kaj E-kultura medio. La kursanoj aŭdos pri la historio kaj karaktero de feroaj baladoj kaj lernos baladigi poemojn, verki novajn baladojn en Esperanto, ĉendanci, kunkanti kaj baladestri. Enkonduko de baladaj ĉendancoj en E-eventojn signifos pliriĉigon de la E-kulturo, pliproksimigon de E-poezio al la E-popolo kaj amuzan metodon por plifirmigo de E-lingvokonoj. Kiel tiu feroa tradiciaĵo aspektas kaj sonas en la moderna tempo montras la filmeto:

<https://www.youtube.com/watch?v=DXN1c11ZyqI>

Kiel ĝi aspektas kaj sonas en Esperanto, ni spertos en Nyiregyhaza.

. ĈĜHISO egĥiso